# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 17/03/2022 Kvincentsepdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 759,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **295,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **189,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **169,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



la esperanta retradio 8 mar2022



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

**"AĜISMO" - NOVA VORTO, MALNOVA DISKRIMINACIO**

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 6 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kioj estas la diferencoj inter prepozicio, prepoziciaĵo, kaj prepozitivo?

2). Kion oni devas fari se oni volas en unu propozicio uzi pli ol unu adjektojn?

3). Ĉu ĉiuj vortradikoj jam apartenas al unu el la vortspecoj, aŭ ĉu ĉiu vortradiko estas neŭtrala?

4). Substantivo (kaj substantiveca infinitivo) povas ĉehavi tri specojn de komplemento, kiuj aldonas signiferojn al tiu substantivo.

Per kia(j) vorto(j) ĉiu el la tri komplementospecoj ligiĝas al sia substantivo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 574. *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 19a de marto estos la tria sabato Venu! *Roger Springer*

## Usona ŝtatvicsekretario agnoskas ke ekzistas biologiaj militlaboratorioj en Ukrainio




US undersecretary of state acknowledges there are biological warfare labs in Ukraine - **World Socialist Web Site** (wsws.org) (elektu el 28 lingvoj, sed ne Esperanto)

# Usono ŝuldas al la mondo respondon pri biolaboratorio:

Necesas atentigi, ke tio estis hazarda malkovro en la konflikto Rusio-Ukrainio, kiu neniel rilatas al la konflikto mem. La determino de la meritoj de ĉi tiu okazaĵo ne estu ligita al la pozicio pri la rusia-ukraina afero. *Global Times* (Ni ĉiuj spertas la danĝerojn de virusoj. LEGU! *Roger Springer* )

US owes world an answer on bio lab: Global Times editorial - Global Times

Mi feliĉas ke mi estas 90 jaraĝa. La konfikto inter la ekonomiaj sistemoj timigas min. *R Springer*





[https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html] kaj por la historio de la situacio
https://www.greanvillepost.com/ *Roger Springer*

# Mi estis profesia soldato.

Mi estis profesia soldato kaj tre fieras pri tiu fakto. Mi ĉiam volis aliĝi al la armeo do je la aĝo de dek kvin tion mi faris. Estis malfacile ĉar mia patro estis altranga komunisto en Britio kaj la bofrato de mia vicpatrino estis komandanto de norvega aerarmea ĉasbazo. Sed ili lasis min tion fari. Mi aliĝis al la kirasa korpuso ĉar mi ne volis fini promeni ĉien kaj pensis, ke ĉirkaŭveturi en granda tanko estos multe pli facila. Je iom pli ol 17-jara mi aliĝis al mia plenkreska regimento, *The Life Guards,* la altranga regimento en la brita armeo kaj ceremoniaj gardistoj de la Monarko same kiel kirasa batalregimento, kaj estis enpostenigita en Singapuro. Dum la tuto de dek du jaroj mi servis en Britio, Singapuro, Malajzio, Kanado, Danio kaj Germanio. Mi servis ankaŭ en Nord-Irlando dum tio, kio estas eŭfemisme nomata La Problemoj, sed fakte estis milito farita de la murdintoj de la IRA. Dum mia (feliĉe) unu kvarmonata turneo sesdek soldatoj estis murditaj, unu el mia regimento, dum multaj aliaj suferis vundojn. Mi estas profunde fiera pri mia servo kaj dirus al ĉiuj, kiuj nomas sin pacifistoj, ke ne ekzistas pli fortaj pacifistoj ol soldatoj, ĉar estas ni, kiuj devas defendi vin, kiam nia lando estas atakita. Estas ni, kiuj ĵetas nian vivon, kiam homoj kiel Putin, Xi Jinping, islamaj teroristoj kaj aliaj minacas vian sekurecon. Estas ni, kiuj, post kiam ni endanĝerigis niajn vivojn, alvenas sur la strato, en malliberejo, en la psikiatria sekcio aŭ mortintoj fariĝas pro memmortigo. Ni ne petas dankojn, ĉar ni malofte ricevas ilin: sed ni ja meritas respekton, ĉar estas ni, kiuj defendas vin kaj purigas la inundojn kaj fajrojn kaj tertremojn aŭ virhospitalojn kiam estas pandemioj. Ni ne estas murdistoj, sed estas trejnitaj por mortigi se kaj kiam tio estas necesa. Ni estas tiuj kiuj devas fari tion por protekti la pacifistojn kiuj rifuzas protekti la infanojn, la virinojn, la maljunulojn kaj ni mortus tiel farante ĉar tio estas kion ni estas pagitaj fari. Mia plej juna filo nun servas en la aŭstralia armeo, sed kiel advokato, kio verŝajne estas pli danĝera ol esti tanke. Ĉiu generacio de mia familio havas profesian soldaton ekde la krimea milito. Krom mia patro kiu estis en *la Royal Air Force*...sed ni ne mencias tion. Li ankaŭ subtenis Arsenalon, do li evidente havis problemon.



*Gordon Coleman*

# La komuna servo. UEA

La komuna servo klopodas pripensi, kunordigi kaj efektivigi strategiojn por helpi homojn, precipe esperantistojn kaj ties familianojn. La servo havas kiel principajn celojn:

1. esti centra ejo por akcepti kaj ligi la diversajn helpajn emojn kaj eblecojn en la Esperanto-komunumo, precipe rilate la koncernan militon;
2. aktive kontakti esperantistojn en Ukrainio kaj atenti iliajn situaciojn kaj de ties familianoj;
3. peri sekurajn kontaktojn inter esperantistoj, inkluzive en Ukrainio kaj Rusio;
4. helpi en la komunikado inter homoj helpo-bezonaj kaj homoj helpo-pretaj, respektante kaj garantiante la privatecon de ambaŭ flankoj ĝis la efektiviĝo de la helpo;
5. meti rifuĝintojn, precipe pro la milito en Ukrainio, en kontakto kun homoj pretaj loĝigi aliulojn;
6. varbi donacojn por la **konto Espero**;
7. identigi aliajn organizaĵojn kaj iniciatojn kun kiuj eblas kunlabori por similaj celoj;
8. arigi volontulojn kapablajn paroli diversajn lingvojn por helpi en la komunikado kun ne-Esperanto-parolantaj homoj aŭ kun neesperantistaj helpo-celaj organizaĵoj kaj iniciatoj;
9. kaj kunlabori kun Landaj Asocioj kaj Sekcioj por la celoj de la helpo-servo.

La helpo-servo funkcias pere de la retadreso helpo-servo@groups.io. Interesatoj helpi en la laborgrupo aŭ informi pri helpo-preteco, ĉu loĝiga, ĉu financa, ĉu alia, povas skribi al tiu adreso. Petoj por la konto Espero por subteno al damaĝitoj en Ukrainio aŭ rifuĝintoj en aliaj landoj, samkiel avertoj pri helpo-bezonaj homoj, precipe esperantistoj kaj ties familianoj, ankaŭ povas esti direktitaj al tiu retadreso. Tiel same konsiloj pri kunlaboro kun jam ekzistantaj neesperantistaj help-iniciatoj. Mesaĝoj senditaj al helpo-servo@groups.io restas plene privataj. Alternative, interesatoj povas rekte kontakti al Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA, respondeca pri Eksteraj Rilatoj, kiu kun TEJO kunordigas la servon, pere de la retadreso fmaiajr@gmail.com.

UEA kaj TEJO jam ekkunlaboras kun individuoj, landaj asocioj, landaj sekcioj kaj neesperantistaj internaciaj organizaĵoj por la celoj de la helpo-servo. **Pasporta Servo** estos unu el la iloj de la helpo-servo. Por donaci al la **konto Espero**, oni aliru https://uea.org/alighoj/donacoj/espero. La helpo-servo raportos periode pri la evoluoj de la laboroj per la komunikkanaloj de UEA kaj TEJO. Ni agnoskas, ke niaj organizaĵoj ne estas grandaj kompare kun aliaj, tamen ni provas helpi laŭ niaj ebloj per nia organiza forto, kun firma konscio pri la unikeco de Esperanto kaj la valoroj de nia movado.



Sendis al AE *Katja Steele*

# La baldaŭa voĉdonado

Pere de la aŭstraliaj esperantistoj numero 573 mi eksciis ke Chris Hollis perdis sian aŭtomobilon pro la inundo . Mi kompatas kaj esperas ke ŝi ne frontis aliajn domaĝojn . Mi kompatas ankaŭ kun la multaj homoj, kiuj subite fariĝis senhejmuloj. Pro la baldaŭa voĉdonado , ĉu ne estas la ĝusta momento por inciti la kanditatojn sin devontigi serioze trakti la klimatŝanĝon, revizii la konstruplanojn , agi tiel ke la mono de la impostpagantoj iru al tiuj, kiuj bezonas ĝin ,ne al la jam plej riĉaj homoj, kaj estu uzata por la komuna bono - se tiu nocio daŭre havas sencon - *Franciska Toubale*






[https://titaniclifeboatacademy.org/images/videolibrary/ukraine_on_fire%20(540p).mp4](https://titaniclifeboatacademy.org/images/videolibrary/ukraine_on_fire%20(540p).mp4)

1horo34minuta interesa filmo




trovis *Roger Springer*

# Falsaj bildoj


Ukrainia militpropagando: Estas nun centoj, verŝajne miloj, da falsaj bildoj cirkulantaj pretendantaj priskribi rusajn "abomenaĵojn" kaj/aŭ ukrainan heroecon. Multaj venas rekte de filmoj (vidu ligon), aŭ videoludoj. Suĉuloj gardu vin.

[Dealing with the Scum Barrage – The Greanville Post](#)

Ne kredu ĉion, kion vi legas. Militoj bezonas la popolan subtenon.

Do oni mensogas. La milito daŭras. Homoj mortas. Notu ke soldatoj estas ankaŭ HOMOJ

La vivstiloj malaperas. La nombro de rifuĝintoj kreskas. **Kulpas ambaŭ flankoj.** *Roger Springer*




La sama bildo uzita por du situacioj

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). Prepozicio estas unu vorto indikita en la vortaro kiel prepozicio.
Prepoziciaĵo estas prepozicio konsistanta el pli ol unu vorto.
Prepozitivo estas plej ofte substantivo kun prepozicio antaŭ si.
(Notu ankaŭ: la enbotelaĵo).

2). Oni rajtas meti ĉiun adjekton ien ajn en la propozicio, sed prefere ĉe la fino.

3). Ĉiu radiko jam apartenas tia al unu el la vortspecoj.

4). Epiteto: Per nenia vorto.
Suplemento: Per prepozicio aŭ subkomprenata prepozicio.
Suborda frazo: Per rilata pronomo (kelkfoje: per rilata adverbo). *Marcel Leereveld.*

# la Komitato de UEA

Aldona punkto, kiu eble interesos viajn legantojn (ĉar la Komitato de UEA tre influis al la vendo-decido de 176 Nieuwe Binnenweg) estas ke ekde 2020 mi volontulas por reprezenti nian karan landon en la rolo de UEA komitatano A sed nun mi estas nur **portempa** komitatano ĝis kiam nova, kaj espereble pli juna, 'viktimo' volontulos.(La kunsidoj ofte okazas post la noktomezo laŭ la adelajda horzono!) Amike *Paulo Desailly*



**3ZZZ** … En la elsendo de la 14a de marto la temoj interaliaj estas : la signifo de feriotagoj kiel la Virina tago aŭ la Labortago kaj kelkaj literaturaĵoj *Franciska Toubale*











Ukraine

Kelkfoje Helpo ne helpas

*Roger Springer*

**Jen** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



# N i  s c i a s  ĉ i o n  p r i  v i !

# KAJ VI SCIAS NENION PRI NIAJ SEKRETOJ.

Tion povas ĝuste diri la registaraj instancoj kaj la kapitalismaj kompanioj. Kaj eĉ la spionoj de fremdaj landoj, se tio interesas ilin.

La spionoj, kelkaj salajrataj, povas esti viaj najbaroj, kolegoj en via laborejo, viaj geamikoj, kaj eĉ viaj samfamilianoj, kaj vi nenion scias pri tio. Iliaj raportoj pri vi restas sekretoj. La raportistoj, la spionoj, salajrataj aŭ ne, ofte estas malpli inteligentaj ol vi, ĉar ĝenerale inteligentaj homoj ne volas perdi sian tempon pri tiu malklera afero. Ili do kelkfoje faras erarojn en sia spionado, kio okazis kelkfoje ankaŭ al mi.

Unu tia eraro de la spionoj estis, ke ili metis min sur la liston de verŝajnaj importado aŭ eksportado de drogoj. Mi ja dum miaj lerneja laboro en multaj ferioj vojaĝis al aziaj landoj. La rezulto estis ke dum alveno kaj foriro en la flughaveno la doganistoj dum pli ol dek jaroj traserĉis min zorge, dum ili sen serĉado tralasis miajn edzinon kaj amikojn. Tiu atento estis eraro de la sekreta servo, ĉar ili neniam trovis drogojn ĉe mi. Post dek jaroj mi decidis konvinki ilin pri ilia eraro, kaj klarigis mian kazon al la tiam Laborpartia federala ministro, kiu kontaktis la ĉefon de la sekreta polico kiu decidis korekti sian eraron. Post tio oni neniam traserĉis min en la flughavenoj.

En alia kazo mi penis trovi laborpostenon en alia lernejo. Volis min dungi *Caulfield Grammar School*, kaj la maritima universitato apud *Sydney,* kaj *Christ Church College* en Pertho. Ili ĉiuj jam ofetis al mi sian postenon pro rekomendo de mia lernejestro de *Friends School*. Do mi devis elekti Sed la estro de la Perth-lernejo volis tamen unue havi la sekretan rekomendon de la lernejestra spiono en *Friends*', kiu hazarde estis bona amiko de mi. Kvankam mi ne sciis lian pozicion de sekreta spiono por la neregistaraj lernejoj. Li sendis sian opinion al Pertho, sed tio daŭris tro longe kaj mi intertempe akceptis la lernejon en *Caulfield*, kie mi restis dudekunu jarojn. Por Esperanto tio estis malbona, ĉar la pertha lernejestro jam estis promesinta al mi, ke li enkondukos Esperanton kiel oficialan kaj ekzameneblan fakon en la tuta lernejo. Li tre deziris havi min, sed li malsukcesis simple ĉar li deziris la oficialan sekretan spionadon. Mia amiko, kiu hazarde ankaŭ transiris al *Caulfield Grammar School*, poste rakontis al mi ĉion pri sia spionado, inkluzive kiuj estis la spionoj en *Friends'*, unu el kiuj estis Esperantisto.

Kelkaj aliaj tiaj eraroj okazis al mi, kaj sendube al aliaj personoj. Antaŭ longa tempo okazis tiom stulta eraro, ne koncerne min, ke la ĉefministro maldungis la ĉefon de unu el la du registaraj sekretaj organizoj. Post tio la registaro dungis por tiu pozicio tre konatan aŭstralian Esperantiston kaj diplomaton. Nuntempe tiuj sekretaj instancoj agas pli bonzorge, ĉar ofte dependas de ili niaj eksterlandaj rilatoj. Momente ili ŝajnas esti tre porusona.

*Marcel Leereveld.*